



Universala Esperanto-Asocio. Jen serio de gvidiloj pri plej diversaj funkcioj kaj aspektoj de la asocia vivo.

Enkonduko

UEA havas strukturon kun Individuaj Membroj (IM) kaj Aligitaj Membroj (AM). La aligitaj membroj estas anoncigitaj al la Asocio tra ĝiaj Landaj Asocioj. Ili ludas rolon en la arigo kaj anoncado de IM, ĉar ili povas arigi kotizojn en la enlanda valuto. Laŭlanda statistiko pri la membraro aperas ĉiujare en la aprila numero de la revuo *Esperanto*. UEA havas momente (februaro 2017) sepdek du aliĝintajn Landajn Asociojn: 8 en Afriko, 12 en Ameriko, 14 en Azio, 36 en Eŭropo (el kiuj 2 momente ne aktivis) kaj 2 en Oceanio. Informoj pri ĉiu Landa Asocio (LA) legeblas en la Jarlibro (en 2017, ekde paĝo 46). Tiu loko registras ankaŭ ekzistantajn asociojn, kiuj ankoraŭ ne petis aliĝon al UEA: 9 en Afriko, 1 en Ameriko, 3 en Azio kaj 1 en Eŭropo. Do, entute UEA registras 86 LA, kiuj efektive agas tutŝtate. Aldoniĝas 11 pliaj asocioj, kiuj reprezentas areojn malpli ol ŝtatajn. Kun tiuj, la plena sumo estas 97 asocioj.

Unu el la celoj de ĉi tiu Gvidilo estas klarigi kaj faciligi la vojon al pretigo de aliĝpeto, kiun traktos la Komitato de UEA, la supera organo de la Asocio.

Bazaj kondiĉoj por aliĝpeto

Asocio petanta aliĝon devas havi minimume 25 membrojn (AM + IM). Se ĝi havas pli ol cent el tiuj, ĝi rajtas nomumi komitatanon A por la decidorgano de la Asocio. Membraro inter 25 kaj 99 rajtigas al la nomumo de observanto.

La kondiĉoj por ekzistanta Asocio kaj por tiuj volontaj aliĝon estas prezentitaj en la Statuto de UEA, en artikolo 13:

Por aliĝi al UEA la kondiĉoj por landa Esperanto-asocio estas, ke ĝi plenumas la kondiĉojn priskribitajn en la Ĝenerala Regularo, ke ĝi estas asocio laŭorde organizita kaj vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro politika aŭ religia sinteno aŭ pro raso, lingvo aŭ sekso, kaj ke ĝi skribas konfirmas sian pretecon respekti la Statuton kaj regulojn de UEA, precipe ĝiajn celojn kaj ĝian neŭtralecon. Landa asocio pagas por ĉiu sia membro, kiu ne estas individua membro de UEA, jaran kotizon difinitan de la Komitato.

Kondiĉo por daŭra aliĝinteco estas, ke la Komitato restas kontenta pri plenumo de la jam difinitaj kondiĉoj kaj deklaro.

Principe UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion, sed la Komitato rajtas akcepti plurajn.

Partoj de tiu teksto estas momente sub diskuto kaj povos esti modifita. La Ĝenerala Regularo de UEA (Artikolo 4) fiksas la minimuman membronombron (25) por povi fari aliĝpeton, la devon pagi kotizon por ĉiu Aligita Membro, kiu ne estas Individua Membro. Temas pri kvindekono de la MA-kotizo por la koncerna lando – do ĝi varias laŭ pagipovo.

Moralaj devoj kaj ebloj

Tiuj validas same por nunaj asocioj kaj por kandidatoj ekde akcepto.

- Kunlabori kun la koncerna kontinenta komisiono.
- Teni registron de lokaj aŭ provincaj societoj kaj subteni ilin.
- Ellabori strategion kaj materialojn por prezenti Esperanton al la publiko en sia lando.
- Eldoni propran revuon aŭ informbultenon, ĉu fizike ĉu rete, laŭeble en minimume du lingvoj.
- Starigi kaj regule prizorgi asocian retejon – laŭeble minimume dulingvan.
- Regule sendi al la revuo *Esperanto* novaĵojn aŭ agadraportojn.
- Respondi al la jara enketilo, se UEA pretigos tiun.
- Organizi mem renkontiĝojn aŭ kuraĝigi al partopreno en aranĝoj en aliaj landoj.
- Pripensi la eblon kun similaj aŭ apudaj landoj okazigi komunajn kongresojn.
- Subteni la instruadon de Esperanto kunlabore kun ILEI-sekcioj, se ekzistas.
- Subteni junularan agadon kunlabore kun sekcio de TEJO, se ekzistas.
- Kunlabori kun la enlanda Unesko-komisiono, Vikipedio, Ĝemelaj Urboj k.s.
- En landoj de limigita pagipovo proponi aktivajn, indajn kandidatojn por membrigo per Fondaĵo Canuto,, instigi ilin reanonci sin ĉiujare.
- En landoj de alta pagipovo, subteni tiun Fondaĵon kaj konsideri 'adopti' helpindan asocion.

Tiu listo neniel estas kompleta. Sekvas formularo per kiu eblas peti aliĝon al UEA.

ALIĜPETO POR LANDA ASOCIO DE UEA

Vi rajtas sendi ĉi tiun formularon al UEA elektronike, sed krome la Centra Oficejo devas ricevi fizikan paperan version, kune kun valida subskribo de la reprezentanto de la Asocio. Se vi printas kaj plenskribas la formularon, bv. skribi legeble; la aliĝpeto estos afiŝita en nia retejo.

Ŝtato aŭ teritorio reprezentota: _____

Oficiala nomo de la Asocio en Esperanto: _____

Oficiala nomo de la Asocio nacilingve: _____

_____ La lingvo: _____

Fondodato kaj loko de la Asocio: _____

Enlanda Membronombro de la Asocio: _____

Nombro de konataj Individuaj Membroj de UEA en la teritorio: _____

Devas esti minimume dudek kvin por proponi Asocion, kaj devas resti minimume 25 por pluivivigi ĝin.

Urboj aŭ regionoj kun membroj aŭ lokaj filioj: _____

Retadreso kaj fizika adreso de la Asocio: _____

Proponata observanto aŭ komitatano: _____

Ret- kaj poŝt-adreso de tiu observanto aŭ komitatano: _____

Nomo de ĉefaj oficuloj de la Asocio:

Prezidanto: _____

Sekretario: _____

Kasisto: _____

Asocia poŝt-adreso: _____ -

Asocia retejo: _____ en lingvoj: _____

Statuso de la Asocio: (jura personeco aŭ ne) _____

Kiu estas la supera organo de la Asocio, kiom ofte ĝi kunvenas? _____

Kiel kaj kiom ofte oni elektas la estraron? _____

Ĉu vi havas ret-grupon por viaj membroj? JES / NE.

Se jes, ĉu vi permesos al UEA rekte sendi komunikojn al viaj membroj pere de tiu grupo? JES / NE

Ni aldonas subskribitan petleteron kaj koncizan raporton pri la planata agado de la asocio.

Ni aldonas elektronike aŭ fizike la Statuton aŭ gvid-dokumenton de la asocio (aŭ ĝia tegmenta organizaĵo).
Bonvolu respondi pri tiom el la sekvaj informoj, kiom eblas:

Dato kaj loko de la kunsido kiu akceptis la statuton: _____

La organo, kiu akceptis la Statuton aŭ gvid-dokumenton: _____

(Se temas pri la fondo-kunsido, kiel raportite supre, sufiĉas indiki tion).

Ni deklaras ke la Asocio estas demokrate organizata kaj funkciigata, kaj ke membreco estas malferma al ĉiuj loĝantoj en la pretendata teritorio

Petanto(j): _____

Subskribo de reprezentanto de la kandidata Asocio: _____

Loko: _____ Dato: _____

===== FINO de la PETILO/GVIDILO =====